

Enskribo

pri la unua komitata kunveno okazinta la 29an de januaro 1957 je la 9.55 horo. Ĉeestis s-anoj Friedrich, Borkovec, Adamcová, Werner, Střelec, Kořínek.

Anstataŭ la malsana prezidanto s-ano Vondroušek malfermas kaj gvidas la kunvenon s-ano Friedrich. Li petas s-anon Kořínek tralegio la lastan enskribon, al kiu neniu havas objeton. Poste la vicprezidanto igas tralegi la sekretarian raporton, kiu prezentas s-ano Kořínek. La raporto estas trovata elĉerpanta tutan agadon de nia rondeto kaj estas aprobita. Poste s-ano Borkovec donas kurtan raporton pri la stato de la kaso, kiu estas laŭkonstate administrata de la Urba Kleriga Komitato. S-ano Adamcová informas pri la antaŭpreparoj por la maskobalo kaj pri la prizorgita orkestro. Estas pridiskutita la nova kandidatlisto, kiu estis preparita por la venontmarda jarkunveno. La kunveno estis finita je la 10.55 horo.

Enskribis Jiří Kořínek

Enskribo

pri la dua komitata kunveno okazinta la 5an de februaro 1957 je la 22.15 h en la klubejo en hotelo Slovan.

Tuj post la okazinta jarkunveno, kiu lokatis ĉi-foje en la komfortega kaj luksa "salono" (Franca salono) kunvenis la nove elektita komitato por dividi la funkciojn. Ĉeestis: Josef Vondroušek, Josef Friedrich, Marie Adamcová, Marta Lorková, Tomáš Borkovec, inĝ. Dro Jaromír Šikula, Jan Wener, Sava Střelec kaj Jiří Kořínek. Prezidis la nove reelektita s-ano Josef Vondroušek. Jenaj funkcioj estis komisiitaj: al s-ano Josef Friedrich – vicprezidanto, Jiří Kořínek – unua sekretario, Marie Adamcová – dua sekretario, Tomáš Borkovec – kasisto, Marie Lorková kaj Jan Werner aferoj junularaj. Oldřich Kaláb bibliotekisto, prof. Vilibald Scheiber aferoj artprogramaj, inĝ. Dro Jaromír Šikula kaj Sava Střelec komitatanoj. Kiel revizoro estis elektita kaj komisiita s-ano Miroslav Němec.

En la anticipinta jarkunveno estis aprobitaj la raportoj de sekretario J. Kořínek kaj de kasisto T. Borkovec post la enkondukaj vortoj de la prezidanto s-ano Vondroušek. La kunvenon salutis la nova estro de la urba domo de kulturo k-do Špička, kiu promesis ĉian helpon al nia laboro kaj de k-do Friedrich, kiu diris laŭdajn vortojn pri nia mastrumado. La novelekton, kiu okazis aklame, gardis s-ano dir. Solčany. Li ankaŭ dankis al la demisiinta prezidanto kaj komitato por ilia ĝistiam laboro. Poste estis elektita nova komitato, kiu estas indikita supre en la enskribo pri la komitata kunveno. Al ambaŭ reprezentantoj de la Domo de Kulturo kore dankis s-ano Vondroušek.

Finite estis je la 22.45.

Enskribis Jiří Kořínek

Enskribo

pri la dua komitata kunveno okazinta la 29an de aprilo 1957 je la 20a horo en kafejo Slavia. Ĉeestis ges. Vondroušek, Friedrich, Adamcová, prof. Scheiber, inĝ. Dro Šikula, Borkovec, Kořínek. Senkulpigis sin ges. Lorková, Werner, Střelec, Kaláb. Post tralego de la lasta enskribo fare de s-ano Kořínek, s-ano Vondroušek pritraktas la preparatan venontan programon de la klubkunvenoj por la proksimaj 4 monatoj. Post kelkaj kompletigoj kaj modifoj la programo estas fiksita kaj s-ano Kořínek komisiita prizorgi aprobojn kaj presigon de la programoj, ke ili estu dissendeblaj antaŭ dimanĉo. Poste s-ano Vondroušek diskutigas pri la varbado por la aŭtunaj kursoj per afiŝoj, ĉe kio oni ankaŭ afiŝu la 70an jubileon de Esperanto. S-ano Kořínek proponas celdirekti varbadon speciale al vendejoj de la Ŝtata Komerco rilate fakton, ke Brno fariĝas foira urbo kaj centro. Estu dezirinde gajni kursanojn inter gvidantoj kaj okupitoj de ŝtataj vendejoj en la urba centro, por ke multaj magazenoj povu esti provizitaj per ŝildeto "Esperanto parolata". Oni decidis,

ke malneton de tia varbletero verku s-anoj Vondroušek kaj Kořínek, oni elektos la pli taŭgan, event. sintezos la ambaŭ. S-ano Vondroušek anoncas, ke estas intereso pri event. ekskursoj eksterlandan kaj oni esploru la eblecojn kaj kostojn.

Finite je la 9.45 h.

Enskribis Jiří Kořínek

Enskribo

pri la tria komitata kunveno okazinta la 29an de aŭgusto 1957 je la 19.30 h en hotelo Slavia. Ĉeestas ges. Vondroušek, Friedrich, Scheiber, Lorková, Borkovec, Kořínek. S-ano Kořínek tralegas la lastan enskribon. S-ano Vondroušek prezentas la novan preparatan programon por la lastaj 4 monatoj. Estas pridiskutataj kelkaj punktoj de la programo. Oni traktas pri la aŭtunaj kursoj kaj ties afiŝado. S-ano Vondroušek raportas ke la estraro de la Domo de Kulturo promesis envicigi niajn aranĝojn en la de ili eldonatan kulturalan supervidon. En la kurs-afiŝoj de D. d. K. estas jam Esperanto indikita sur la sesa loko. Poste oni traktas pri la preparata Esp. ekspozicio, kiu okazos de la 6. de oktobro ĝis la 20a en la artindustria muzeo. S-ano Vondroušek informas pri la antaŭvidataj kostoj de la ekspozicio. La ĉambrego kostos semajne 50,- Kčs plus postfina plena purigo de la halo por ĉ. 100 Kčs. S-ano Smečka estas komisiita pri la artisma flanko kaj instalado de la ekspozicio. Estis decidite en la tujsekvaj tagoj eldoni 4-paĝan bultenon dissendotan kun la nova programo.

Finite je la 21.30 h.

Enskribis Jiří Kořínek

Enskribo

pri la kvara komitata kunveno, kiu okazis la 21-an de novembro 1957 en kafejo Slavia je la 20a h.

Ĉeestis ges. Vondroušek, Adamcová, Lorková, Borkovec, dro Kaláb, Kořínek. Post tralego de enskribo pri la lasta komit. kunveno fare de s-ano Kořínek, s-ano Vondroušek raportas pri la okazinta E-ekspozicio en la Artindustria muzeo. La ekspozicio, daŭrinta de la 13a – 29a de oktobro, plene sukcesis, ĉefe dum la lastaj 3 tagoj; kiam en la teretaxaj spacoj okazis la juvelista ekspozicio, kiu venigis ankaŭ al niaj ekspoziciaĵoj multajn vizitantojn. En la elmetitan foliaron subskribiĝis ĉ. 1100 homoj sed pluraj centoj tute ne enskribiĝis. S-ano Vondroušek dankas al s-anino Adamcová por la sindona ĉiutaga deĵorado ĉe la ekspozicio. Plene li dankas al s-anoj Smečka por la belgusta instalado kaj artisme faritaj multaj afiŝoj; li ankaŭ dankas al junularano s-ano Duda, kiu fervore helpadis ĉe la instalado. Estis ekspozitaj krom alia materialo ĉ. 300 libroj. Kostoj estis Kčs 500 al s-ano Smečka, 88,- superhoroj al la pordisto, 220,- al la purigistinoj. S-anino Adamcová raportas pri ŝia kunlaboro ĉe eldonaĵo "Infanoj de la Mondo" kaj la prezidanto dankas ŝin pro la oferema kunlaboro kun ĉi tiu japana eldonejo. S-ano inĝ. Dro Šikula komunikas al ni starpunkton de la C.K. de la Komunista partio, laŭ kiu estu nia komitato kompletigata per pluaj partianoj kaj oni proponas ges. Balay kaj Zitová. Oni priparolas la samtempan eldonon de nova Bulteno kaj programo por la Zamenhof-vespero, kiu okazos ree sabate, la 14an de dec. en la Ŝtata konservatorio. Oni traktas pri okazigo de Regiona Kunveno en la unuaj monatoj de la venonta jaro. Estas propono okazigi seminarion en la semajn antaŭ la maskobalo, kaj post ĝi junularan konferencon. Por la junulara Regiona Kunveno oni volus inviti Verda Ĉaron de Julio Baghy por prezenti Pygmalion aŭ Nora'n. Sed devus esti denove okazo por rabata fervojvojaĝo al Brno, ĉar la venigo de la ensemblo V. Ĉ. estus afero probable kostonta 200,-. Ne estis farita definitiva decido kaj oni plu konsideros la du aranĝojn. Finite je la 22.15 h.

Enskribis Jiří Kořínek